

# Sud-Rejna Kuriero

Julio  
2012

## Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°47

Espace 110  
FR-68110 ILLZACH  
CCP 19684 F Strasbourg  
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel  
Postfach 178  
CH-4005 Basel  
esperantobasel@gmx.ch

*Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,*

*Jam alvenis la someraj monatoj.  
Nia lernojaro ĵus finiĝis per komuna manĝo la sepan de julio ĉe la Rejno.*

*Niaj ĉefaj aktivaĵoj bone funkciis en lastaj monatoj. La verdaj fadenoj en la lastaj lundoj de monatoj ĉiam allogis partoprenantojn. Ni daŭrigos ilin en venonta septembro.*

*La partopreno de nia grupo en la manifestacio "Vitarue" preskaŭ ĉiudimanĉe matene estis sukcesa. Vi legos pri ĝi.*

*Jen ankaŭ invito portopreni la komunan aranĝon de Bavelo kaj EFE en Ortenberg fine de septembro.*

*Kaj finfine ni deziras al ĉiuj :*

*André Grossmann*



La Rejno en Village-Neuf

# Agrablajn somerajn feriojn

Karaj geamikoj,  
ni denove kore invitas vin al Amika Tago - ĉi-jare en Freiburg.

**resume:**

- 10:00 kiuj venas per aŭtoj, povas parki apud Treffpunkt, komune per tramo en la centron
- 10.30 renkontiĝo en la ĉefa enirejo de la katedralo (aŭtoveturantoj povas antaŭe parki ĉe Treffpunkt kaj de tie veturi komune per tramo en la centron: renkonto ĉe Treffpunkt 10:00)
- 11:30 komuna ekiro al urbogvidado, kun promenado al "Kastaniengarten" por tie manĝi
- 14:00 irado al tramo kaj vizitado de kvartalo Vauban
- 16:00 kafumado en Treffpunkt

Estus bone, se vi sendas noton pri via alveno al Ursula  
([ursula.niesert@esperanto.de](mailto:ursula.niesert@esperanto.de); tel: ++49 - 761 - 289 299)

Detalaj informoj estas senditaj per nia dissendolisto:  
[mulhouse-esperanto@yahoo.com](mailto:mulhouse-esperanto@yahoo.com)

## **Für Pazifismus und Esperanto Schwerer Start (Fortsetzung)**

Umsatz bringen reißerische Titel wie „Heinrich Heine und die Frauen“ und eine Reihe, die man der Kategorie Ratgeber-Literatur zuordnen kann. Ein schmaler Band mit dem Titel „Die Hygiene der Flitterwochen“ hat es in einem halben Jahr auf zwei Auflagen gebracht und wurde zum Preis von 2 Mark 6'000 mal verkauft. Als Ratgeber für junge Ehepaare deklariert, enthält es die begehrten praktischen Informationen zu Sexualität und Empfängnisverhütung – verständlich beschrieben von dem Mediziner Otto Dornbluth. Auf die Reihe „Fried's Hygienische Bibliothek“ wurde im Briefpapier von Anfang der 1890er Jahre ausdrücklich hingewiesen. Ein Beispiel dafür, wie geschickt Fried alle Möglichkeiten zur Werbung genutzt hat.

Dieses Geschick kam später auch der Friedensbewegung zugute. Auch Übersetzungen des italienischen Sexualreformers Paolo Mantegazza gehören zum Verlagsprogramm und waren den Behörden ein Dorn im Auge. Frieds Partner Jacques Gnadenfeld wird 1892 wegen Verbreitung unzüchtiger Schriften angeklagt.

Der Umsatz steigt, und der Verdienst von Fried erreicht im zweiten Jahr des Verlags 17'000 Mark. Ein Drittel davon geht an seine Familie in Wien. Doch es gibt Probleme mit dem Teilhaber Jacques Gnadenfeld, dessen Schwester

Gertrude Fried geheiratet hat. Man trennt sich und Fried muss lukrative Titel beim alten Verlag lassen.

### **Friedenskämpfer und Pazifist**

Anfang November 1891 saß Alfred Hermann Fried wie gewohnt im seinem Stammcafé im Hotel Kaiserhof und studierte die internationale Presse. Da las er von den Aktivitäten einer Baronin von Suttner in Österreich. Später erinnerte er sich : „Wie, es gab also in Wien eine Gesellschaft, die sich die Bekämpfung des Krieges zur Aufgabe stellt, es gab also noch Menschen, die wie ich den Krieg als Übel ansahen, es gab also solche Menschen in verschiedenen Ländern, so dass sie sich zu einem internationalen Kongress vereinigen konnten?(...) Zu diesen Menschen gehöre ich, rief es in mir, an ihrer Arbeit mitwirken, ist meine Aufgabe ! Zu ihnen!“.

Sofort schrieb er einen Brief an Bertha von Suttner, in dem er seine Sympathie für ihr Wirken zum Ausdruck brachte und seine Mitarbeit anbot. Bertha von Suttner hatte 1889 mit ihrem Roman „Die Waffen nieder“ die Grausamkeit des Krieges geschildert, den Militarismus angeprangert und eine Zukunft jenseits nationaler Differenzen beschrieben.

Im Oktober 1891 hatte in Wien die Gründung einer „Österreichischen Gesellschaft der Friedensfreunde“ stattgefunden, deren Vorstand von hoch gestellten Personen gebildet wurde. Sie wählte sechs Delegierte für die III. Interparlamentarische Konferenz und den folgenden III. Weltfriedenskongress in Rom.

Ganz aus heiterem Himmel kam Frieds Initiative nicht. Schon in Wien hatte er die Ausstellung des Malers Wassili Wassiljewitsch Wereschtschagin mit Bildern aus dem Russisch-Türkischen Krieg 1877/78 besucht, die ihm, wie den fast 100'000 anderen Besuchern, die Barbarei und Sinnlosigkeit eines Krieges deutlich gemacht hat. Bereits nach dem Besuch der Ausstellung, die später auch in Berlin gezeigt wurde, wollte er etwas für den Frieden tun. Jetzt schien der rechte Moment zu sein.

Frieds Vorschlag bestand darin, eine Zeitschrift mit dem gut eingeführten Titel „Die Waffen nieder“ zu gründen. Er hatte sich von der renommierten Autorin einen Zuschuss für seinen notleidenden Verlag erhofft, die ebenfalls klappte Bertha von Suttner erwartete ihrerseits von Fried eine Honorierung ihrer Arbeit. Es spricht für die Ernsthaftigkeit von Frieds Engagement, dass sie zu einer Einigung kommen und die neue Zeitschrift schon am 1. Februar 1892 in Wien und Berlin erscheint.

## Verdaj Fadenoj en Mulhouse kaj Saint-Louis

Regule okazis la verdaj fadenoj en Mulhouse kaj en Saint-Louis, plej ofte en la lasta lundo de la monato.

Ili ebligas renkontiĝi en restoracio por kune amike babili sen **krokodilado**. Kiam ili okazas en Saint-Louis ni havas ankaŭ la plezuron akcepti membrojn el la proksima Bazela Grupo, kun kiu ni kunlaboras por eldoni nian bultenon Sud-Rejna Kuriero. La lasta kunveno okazis la 25an de junio en la restoracio de la Poste en Saint-Louis.



Dum la feriaj monatoj ne okazas la verdaj fadenoj. Sed estis decidita ilin daŭrigi ekde venonta septembro. Krome venis propono el Bazelo okazigi unu verdan fadenon en Rheinfeld en Germanio. Pri ĝi zorgus Hans Meier. Bertrand kaj Jacques informos nin per nia dissendolisto, kiam kaj kie okazos la venontaj verdaj fadenoj kaj ĉefe pri la unua, fine en septembro.

Krome necesas danki ilin pro la iniciato kaj pro la bona organizado.

Andreo



## KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2012-2014

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivaĵojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

**Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.**

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Kotizo	Abono
2012	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
2013	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
2014	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj

Pagebla al André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM  
Ĉekojn je la nomo de:  
Mulhouse-Esperanto  
CCP 19684 F Strasbourg.



# Vitarue

Jam de la 20a de majo okazas preskaŭ ĉiu-dimanĉe de la 10a30 ĝis la 12a30, tiu manifestacio laŭlonge de la rivero l'Ill en Mulhouse. Pluraj el niaj membroj akceptis deĵori, Yves, Andreo, Jacques, Bertrand, Simone.

Ni uzas simplan piknikan tablon, kelkajn librojn, ni disdonas la kalendaretojn kaj proponas subskribi la peticion "L'Espéranto au Bac". Tiel ni informas pri la lingvo kaj rikoltas subskribojn.



La 20a de majo deĵoris Yves kaj Andreo



La principo de tiu manifestacio "Vitarue" estas la senpageco. Neniu vendas ion kaj nenio estas aĉetebla. Ankaŭ ĉe nia tablo estis tiel. Aliloke eblis gustumi specialaĵojn, vegetarajn manĝojn. Krome la etoso estas tute simpatia, ĉefe kiam regas bela vetero.



## Allée des arts

- ✗ Atelier culinaire
- Poésie
- Lecture
- Ecriture
- Origami
- ✗ Théâtre d'improvisation
- Calligraphie chinoise
- Calligraphie arabe
- ✗ Tricot
- ✗ Crochet
- Dessin
- Mandala
- Accessoires tissu
- Poterie
- ✗ Maquillage
- ✗ Allemand
- ✗ Esperanto
- ✗ Musique



La loko por Esperanto troviĝis ĉefe ĉe la ĉina ponto. Tie eblis starigi tablon, meti afiŝojn.

Granda afiŝo montris la enskribitajn grupojn, kiuj libere povis partopreni en ĉiu dimanĉo aŭ nur kelkajn. Ĉe aliaj lokoj estis proponitaj diversaj muzik-instrumentoj por infanoj.



## Vivu via strato

En la sabata numero de la ĵurnalo l'Alsace estis anoncita la aktivaĵoj de la morgaŭa dimanĉo, inkluzive de Esperanto.

### Les activités de

- Vita'Rue propose les activités suivantes demain matin, à partir de 10 h 30, sur les berges de l'III.
- **Allée des Arts** : atelier d'écriture, gri-gri, mandala, théâtre d'improvisation, loisirs créatifs (association Caritas), performance artistique sur le pont chinois.
- **Boulevard des Méridiens** : qi qong, tai-chi-chuan, sophrologie.
- **Quartier des Mômes** : espace parents-enfants (0-3 ans), contes pour enfants.

### demain

- **Langues** : espéranto.
- **Avenue Vitaminée** : cuisses abdos fessiers, ultimate, marche nordique, urban athlétisme, graff, aqua fitness, boxe.
- **Passage des Gourmets** : cuisine végétarienne.
- **Cour des Sens** : fabrication de nichoirs.
- **Place des Jeux** : jeux anciens, contes sur l'histoire d'Angleterre (association Étincelle).
- **Place des songes** : démonstration de tango, radio MNE, pique-nique.

La 9an de julio aperis en la ĵurnalo l'Alsace tuta artikolo pri "Vitarue". La ĵurnalisto eĉ petis, kiel traduki "Vitarue" al Esperanto.



Comme tous les dimanches jusqu'au 22 juillet, le collectif Vita'Rue a fait des berges de l'III un havre de gratuité et de découvertes, marqué hier matin par une installation artistique participative qui a transformé le pont chinois.

Pleuvra, pleuvra pas ? On a pas mal scruté le ciel, hier matin, à Vita'Rue, manifestation éminemment dépendante des caprices de la météo... Une météo qui s'est avérée clémente, avec juste ce qu'il faut de menace pour donner envie de profiter de l'instant présent. Une bien belle édition : « *Les gens sont bien détendus dès leur arrivée, on sent que les vacances scolaires ont commencé* », observent Marie-Thérèse et Fada, deux bénévoles postées à la Croisée bienvenue, l'accueil au pied du pont chinois.

Celui-ci est l'objet de toutes les attentions, ce matin-là : deux artistes proches du collectif ont été invitées à y installer, avec l'aide du public, une création qui n'est pas passée inaperçue. Des dizaines de bandes de signalisa-





tion de chantier ont été nouées à la rambarde, formant ainsi un vaste rideau sous le pont, ondulant joliment au gré du vent. « *Des barrières détournées de leur usage habituel, comme pour protéger un lieu, un moment* », expliquent Zahra Ferhati et Angélique Kerval, les artistes, tandis que les petites mains des visiteurs s'agitent pour compléter l'œuvre au fur et à mesure que la matinée avance.

## Premiers mots d'espéranto, cocktails sans alcool, recette de burger de lentilles... on en apprend des choses à Vita'Rue

L'installation a en tout cas le mérite de signaler de loin qu'il se passe dans le coin quelque chose de pas commun, comme un chantier effectivement, celui d'une manière de se divertir et de se bouger dans l'esprit de la gratuité, du don et du contre-don (pas un centime ne circule à Vita'Rue). Invitée de ce 8<sup>e</sup> dimanche matin, l'association Caritas propose plusieurs ateliers originaux à base d'acrostiches, de piage sur vieux livres (ça fait de mignons hérissons) ou encore de confection de cocktails sans alcools par les enfants.

Oui, on en apprend des choses à Vita'Rue, même nos premiers mots d'espéranto, enseignés par André Grossmann, militant convainquant de l'enseignement de cette langue universelle. Ou encore une recette de burger de lentilles, réalisation de l'atelier culinaire de la semaine : « *Elle provoque des réactions plus contrastées que les recettes qu'on propose d'habitude, révèle l'animatrice. Ou les gens s'y intéressent précisément parce que c'est végétarien, ou ils la rejettent pour la même raison !* »

Sur les pelouses, les amateurs de sports de détente effectuent leurs derniers mouvements de la matinée. Aux polyrythmies créées par les enfants à l'atelier percussion, se mêlent alors les accents chaloupés de l'initiation au tango proposée par la compagnie Estrotango sur une piste installée devant la Maison des berges. Un couple de débutants se tâte avant de se lancer : « *Allez, c'est pour essayer, on n'a rien à perdre* ». Le prof est là pour les guider sur les pas des initiés, fascinants à observer. Toujours pas une goutte, le pique-nique peut commencer. Comme on dit en espéranto : « *vivu via strato* », vivez votre rue, une utopie réalisée.

Sylvain Freyburger

La 15an de julio la vetero estis pluva, malgraŭ tio okazis la manifestacio. Feliĉe Jacques sukcesis ekhavi grandan ombrelon, kie ni povis ŝirmiĝi. Sub ĝi ni metis blankan tabulon. La homoj venis al nia ombrelo, kie ni okazigis kvazaŭ senpagajn Esperantolecionojn. Estas granda intereso kaj ni sukcesis kolekti pliajn subskribojn.



Fotoj kaj tekstoj de Andreo



# La 64-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO -19-25 majo 2012

La Esperanto-urbo *Herzberg am Harz* havis okazon gastigi la 64-an Internacian Fervojistan E-kongreson. Aliĝis al ĝi 162 esperantistoj el 21 landoj el kvar kontinentoj. La plej foraj venis el Brazilo, Ĉinio, Ganao, Meksiko. La plej junaj partoprenantoj (dujaraĝaj) estis la knabo Samuel el Ĉeĥio kaj la knabino Kendra el Ganao. Ili amikiĝis sabate dum la interkona vespero. La aranĝon organizis germanaj fervojistoj kun la helpo de lokaj esperantistoj. La slogano "La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn" bonvenigis la partoprenantojn.

Dimanĉe la inaŭguro komenciĝis per recitado de la poemo *La vojo fare de junaj knabinoj*. Sekvis salutvortoj de la reprezentantino de BSW kaj de la urbestro, kiu parolis esperantlingve. Nome de ILEI salutis Stefan MacGill. Li gvidis dum tri tagoj lingvo-seminarion. Sekvis salutoj de landaj reprezentantoj sub la reĝisorado de la ĉefdelegito Jindřich Tomílek. Dum paŭzoj estis prezentitaj muzikaĵoj. Ankaŭ la virkoruso el Hannover plezurigis la ĉeestantojn. La prezidantino de IFEF Rodica Todor disdonis diplomojn pro meritoj al la LKK-prezidanto Achim Meinel, al la prizorgantoj de la Interkultura Centro Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar kaj al la urbestro Ger-

hard Walter. Poste ŝi deklaris la kongreson malfermita. Sekvis komuna fotado kaj uniformparado tra la urbo kun E-flagoj kaj ankaŭ tiuj de la koncernaj landoj. Akompanis nin muzikistoj. La etoso estis tre gaja kaj entuziasma. Posttagmeze la urbestro Gerhard Walter inaŭguris



HERZBERG am HARZ

antaŭ la stacidomo la Esperanto-placon kaj Joachim Giessner vojon. Por plezuro muzikis blovorkestro. La tago finiĝis per kantoj kaj dancoj de folkora grupo el apuda vilaĝo.

Lunde matene la partoprenantoj havis okazon viziti la kastelon de Herzberg kaj tie vidi la ekspozicion pri fervojo kaj la muzeon. Dume la reprezentantoj de IFEF ĝuis bonvenigan akcepton de la vicurbestro en la Kavalira salono de la kastelo. Posttagmeze la interesitoj povis aŭskulti prelegon pri la Internacia Centro Herzberg (ICH) kun fotoprezentado aŭ fakan diskutadon

pri fervojo. Poste la kongresanoj partoprenis gviditan urbopromenadon kun vizito de la ICH. La vespero estis dediĉita al la balo kun malgranda bankedo. Oni dancis kun ĝojo ĝis preskaŭ noktomezo kun akompano de agrabla muzikorkestro.

Marde antaŭtagmeze okazis publika plenkunsido. Unue estis legitaj la alvenintaj salutmesaĝoj kaj poste oni traktis plurajn fervojistajn aferojn. Posttagmeze okazis duontaga ekskurso al Scharzfeld, kie oni vizitis la Unu-kornulan gronton. Vespere ni spektis filmon pri "175 jaroj de fervojoj en Germanio". Temis pri historia evoluo de la germana fervoj-trafiko eĉ kun malagrablaj militaj eventoj. Ĉe la fino okazis lotumado. Feliĉa dano gajnis belajn skribilojn donacitajn de BSW.

La merkredo estis dediĉita al tuttaga pertrajna ekskurso al Wernigerode. La reveno tra Harzmontaro okazis per buso. La partoprenantoj estis ravitaj. Aliaj povis profiti gviditan promenadon tra Herzberg. Vespere koncertis Ralph Glomp el Hamburgo. En lokaj ĵurnaloj aperis pluraj artikoloj koncernantaj la fervojistan kongreson.

Ĵaŭde matene okazis fervojtemaj prelegoj, kiujn enkondukis kaj gvidis Ladislav Kovář. Oni prelegis pri baltmara tunelo, pri etŝpuraj fervojoj, pri fervoja projekto Stutgart, pri metroo en Rijad, pri trafika salono en universitato de Pardubice, pri nova silkvojo. Oni rememoris la lokan Espioniron Joachim Giessner

kaj elstarajn kroatajn esperantistojn. Oni ankaŭ eksciis pri novaĵoj de la bulgaraj fervojoj. Dum la paŭzo estis prezentita luebla biciklo, kiu bone funkciis dum la kongresaj tagoj. Posttagmeze la interesitoj havis eblecon ekskursi tra la Harzmontaro al la pitoreska urbo Goslar. Vespere, la belsona voĉo de la itala kantisto Manuel Ĝojigis la partoprenantojn preskaŭ ĝis la noktomezo. Iuj ne rezistis kaj komencis danci. Dum la paŭzo li montris filmeton pri sia nigra kato, kiun li alkutimigis al balaila (eĉ "forta") karesado. Li ankaŭ interpretis memverkitan kanton dediĉitan al sia amata kato.

Vendrede matene oni prezentis la venontan IFEF-kongreson okazontan komence de majo en Francio proksime de Bordoza, en "Artigues-près-Bordeaux". La alloga prezento espereble kunvenigos multajn esperantistojn. Poste la faka komisiono diskutis publike kaj fine oni pri-traktis movadajn aferojn. Sekvis dankvortoj kaj donacetoj al LKK-anoj kaj transdono de la kongresflago. Per la E-himno ĉio finiĝis kaj Rodica Todor fermis la eventoriĉan kongreson.



Fotoj kaj teksto de Liba

# Jarfina fest-manĝo ĉe la Rejno

La lernoĵaro finiĝis fine de junio. En Espace 110 daŭre funkciis nia kurso kun 5 gelernantoj. Komence ni uzis la 3 librojn kaj la ekzercojn de "Katrina". La 3 libroj rakontas pri la vivo de Katrina, kiu sopiras krei familion. Tre simpla stilo kun interesaj rakontoj. Poste ni ekuzis la bild-rakonton de "Tinĉjo en Tibeto" kun ties akompana libro.

Por festi la finon de la lernoĵaro de nia grupo "Mulhouse-Esperanto" estis proponitaj diversaj vendredoj en junio kaj julio. Estis malfacile ebligi al ĉiuj partopreni. Finfine ni decidis por la 7a de julio 2012.

La 7an de julio okazis nia jar-fina fest-manĝo ĉe la Rejno en restoracio "Piste du Rhin" en Village-Neuf". De la restoracio eblis vidi la Rejnnon.

La nombro da partoprenantoj ne estis tre alta, eble pro la tro malfrua dato, ĉar pluraj jam feris, aliaj festis en aliaj lokoj. Pro la proksimeco al Bazelo ni planis eĉ partoprenon de baze-



lanoj, kiuj fakte ne venis.

Supozeble necesas plani tian manĝon pli frue en junio kaj eble elekti ĵaŭdon anstataŭ vendredon.

Malgraŭ tio la 9 kunmanĝantoj pasigis agrablan vesperon en bela kadro kaj kun bongustaj manĝoj.



# La domo de la mond-civitanoj (D.M.C) akceptas Esperanton

Tiu internacia societo estas :

1. instanco de proponoj por krei demokratiajn instituciojn, kiuj kapablas proponi justajn solvojn al ĉiuj problemoj de la planedo koncerne la loĝantarojn, kulturojn kaj medion
2. ago-forto, kiu disponigas akceptejoj por aŭskulto kaj solidareco ekzemple en Mulhouse la D.M.C situanta 20 strato Schutzenberger kreis
  - unu senpagan magazeton
  - unu solidarecan restoracion
  - kaj akceptlokojn por fremduloj kaj senlaboruloj.

Ĝi ankaŭ planas help-projektojn por la afrikaj disvolviĝantaj landoj  
Septembre , mi estas invitita partopreni kunvenon de la administrantaron de la D.M.C, mi ne tre klopodis, nature, por konvinki la membrojn pri la intereso, kiun prezentus por la mondcivitanoj internacia komunikilo neŭtra, justa, facila kaj defendanta sendiskriminacie la regionajn kaj naciajn kulturojn.  
La prezidanto petis de mi tekstoproponon por la promocio de Esperanto, kiun li intencis prezenti ĉe la nacia kunveno de la asocio . Cetere la administrantaro decidis meti sian ejon je dispono de Esperanto por informado kaj instruado

Oktobre kelkaj membroj decidis malkovri nian lingvon sed pro tempomanko nur 2 el ili sekvis ĝis la fino la proponitan programon ; Ambaŭ deziras daŭrigi en venonta oktobre 2012, post la decido de la D.M.C, ke esperanta metio estos malfermata al la publiko . La asocio zorgos pri la informado.

Mia programo :

- unu prezento de Esperanto (historio kaj lingva funkciado )
- 9 aŭ10 renkontoj por malkovrigi bazan vortprovizon kaj la ĉefajn gramatikajn regulojn
- mi proponas tiam por la fundesploro de la lingvo 3 eblojn :
  - o kursojn kun instruisto (informo ĉe Andreo )
  - o retan aŭ korespondan metodon (informo ĉe Edmond )
  - o la metodon ASSIMIL , tiuokaze mi proponas akompani
    - \* la lernantojn dum la unaj lecionoj ( 4 aŭ 5 renkontoj )
    - \* poste mi proponas unu monatan renkonton por iniciado al la konversacio

Jacques

# 34a BAVELO- 72a regiona Seminario staĝo de

**esperanto**  
*France-Est*

Okazos en Germanio de 21a ĝis 23a de Septembro 2012  
Junulargastejo Kastelo Ortenberg Burgweg 21  
77799 Ortenberg  
Tel: +49.781.31749 Fakso: +49.781.9481031

## Esperanto - lingvo kaj pli



Lerni Esperanton estas plezuro. Precipe se tio okazas en la gaja rondo de internacia lern-semajnfino. Nia seminario, ĉi-foje en la jaro de la 125-jara ekzistado de Esperanto, ofertas buntan programon kun diversaj elstaraj programeroj:

Tute novan korpo-senton peras veturado per "starveturilo", sole per kliniĝo antaŭen/malantaŭen oni stiras du-radan veturilon, akcelas kaj bremsas same nur per ŝanĝo de la pezo-centro. Ekscitiga sperto kaj vera defio.

Same interesa estas la ŝipveturado ĉirkaŭ la urbocentro de Strasburgo. Kiel lingvo de la sonsistemo sur la ŝipo elekteblas ankaŭ Esperanto en kanalo 10.

Aldone al niaj "klasikaj" kursoj por komencantoj kaj komencintoj ni ofertas paroligan kurson kaj multifacetan bukedan kurson. Krome allogas instiga vespera programo, i.a. kun prezentado de Georgo Handzlik en la rolo de Ludoviko Lazaro Zamenhof.



## Ortenberg: Loko de la BAVELO-Seminario 2012

La komunumo Ortenberg troviĝas proksime de Offenburg, ĉe la piedo de la Nigra Arbaro. Ortenberg estas vilaĝo de vinkultivado, situanta ĉe la Badena Vins-trato. Elstara vidindaĵo estas la Kastelo Ortenberg, starigita meze de la 19-a jarcento sur la ruinoj de la malnova burgo, kiu originas en la 11-a/12-a jarcento. Nuntempe la kastelo estas uzata kiel junulargastejo.



## Ĉi-jare ĝi ankaŭ estas la ejo de nia **BAVELO-Seminario**:

Junulargastejo Kastelo Ortenberg (vidu pli malsupre Alvojaĝo)

Burgweg 21

77799 Ortenberg

Tel: +49.781.31749

Fakso: +49.781.9481031

Edys Hotel-Restaurant im Glattfelder

Kinzigtalstraße 20

77799 Ortenberg

Tel: +49.781.9349-0

Fakso: +49.781.9349-29

info@edys-restaurant-hotel.de

### **Tranoktado**

Se vi preferas ne loĝi en la junulargastejo, bonvolu mem mendi vian ĉambron. Proksima hotelo estas =>

### **Alvojaĝo per trajno:** Veturu

ĝis la stacidomo de Offenburg, post per buso 7134 aŭ 7160 ĝis Ortenberg, haltejo Schloss/Freudental (daŭro ĉ. 10 min). De tie sekvu la ĉefstraton direkte al Gengenbach ĝis la gastejo Krone, poste iru maldekstren laŭ strato Burgweg ĝis la junulargastejo (ĉ. 500 m).

**Alvojaĝo per aŭto:** Sur aŭtoŝoseo A5 (Frankfurto-Bazelo) ĝis elirejo Offenburg, poste daŭrigu sur strato B33 direkte al Villingen-Schwenningen. Post Offenburg sekvu la elirejon Ortenberg-Elgersweier. En Ortenberg veturu ĉiam rekte ĝis trans la malgranda trafikcirklo (mallarĝa strato maldekstre de la gastejo Krone) kaj sekvu la straton Burgweg ĝis la kastelo.

## Provizora Programo de la **BAVELO-Seminario 2012**

### **Kursoj**

- A - Kurso por komencantoj 1
- B - Kurso por komencantoj 2
- C - *Paroliga Kurso* - Konversacio/diskutado pri interesaj temoj
- D - *Bukeda Kurso* por progresintoj kaj spertaj parolantoj, celataj temoj:
  - ◆ La jubilea jaro kaj ni - diskutrodo
  - ◆ Esperanto-historio en Alzaco
  - ◆ Kiel funkcias la star-veturilo
  - ◆ Stuttgart 21
  - ◆ Bildoj kaj anekdotoj el 8 jaroj da *Blue floras la genciano*
  - ◆ Pecha Kucha - distra informtekniko
  - ◆ Filmo: *La universala lingvo*

**Aliĝilon bonvolu sendi al:**  
**S-ino Inge SIMON,**  
**Brünner Str. 20**  
**DE-73431AALEN**  
**Tel. 00.49-7361/ 360 615, Inge.**  
**Simon@esperanto.de**



## Turisma programo, i.a.

- ◆ Star-veturado tra Strasburgo
- ◆ Batorama-ŝipveturado tra Strasburgo, sonsistemo ŝaltebla al Esperanto

## Vespera programo, i.a.

- ◆ Gvidata rondiro tra la kastelo
- ◆ Prezento de *Ludoviko Lazaro Zamenhof* kun Georgo Handzlik

Eblas aliĝi elektronike ĉe la retejo <http://esperanto-bw.de/seminario-eo> per la formularo aŭ ĉe Inge Simon (retpoŝte aŭ telefone: +49.7361.360.615).

La aliĝkoto estas 30 € (resp. 15 € por gejunuloj ĝis 30-jaraj). Aldoniĝas laŭkaze la kostoj por tranoktado/manĝado en la junulargastejo respektive la Star-veturado tra Strasburgo.

Kostoj por du tagoj inkluzive de manĝado en la junulargastejo, tranoktado en plurlita ĉambro: 67 €. Nur manĝado: 32 €.

### Mi / ni partoprenos la kurson kaj programon

- A komencanto 1     B komencanto 2  
 C Paroliga kurso     D Bukeda kurso  
 Star-veturado (sabate posttagemeze, 70 €)  
 Ŝipveturado en Strasburgo kun Esperanto-klarigoj

#### Tranoktado:

- Ne bezonata, mi mem zorgas pri tio  
 vendrede/sabate en junulargastejo (plurlita ĉambro)

### Aliĝilo al la Bavelo/EFE-seminario en Ortenberg

#### Manĝoj:

- mi ne kunmanĝos  
 vendrede/sabate en junulargastejo  
 sabate/dimanĉe en junulargastejo

#### Aliaj rimarkoj:

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo
1		
2		
3		
4		
Adreso		
Telefono:		
Ret-adreso:		
Mi pagas la sumon.....al Esperanto France-Est		

La aliĝo validas post alveno de mono:  
Pagebla per ĝiro al CCP Esperanto France-Est  
1997 72 W Nancy  
per franca ĉeko al Esperanto France-Est sendata al  
André GROSSMANN  
5, rue des Pyrénées  
68390 BALDERSHEIM  
ret-adreso:  
[andreo.ag08@free.fr](mailto:andreo.ag08@free.fr)

## Niaj legantoj skribas

**Ni proponas al vi malfermi novan rubrikon, en kiu niaj legantoj povas esprimi siajn opiniojn aŭ mallonge raportoj pri iu evento aŭ travivaĵo.**

**Jacques legis la libron « Tuikero la harkio kaj la cetero » de Roger Condon. Jen liaj komentoj.**

Antaŭ 50 jaroj, la interkonsentoj de Evian finis por Francio kaj Alĝerio 130 jarojn da suferoj, larmoj, kaj sango. Tiu koloniado suferis pro sporadoj ribeloj kontraŭ submetiĝoj kaj finiĝis post 8 jaroj da milito, unu civila milito kaj ekfuĝo de 900000 personoj . Vere tiu paĝo ne estas la plej bela de nia historio

La oficiala interpaciĝo, ankoraŭ atendata de ambaŭ flankoj de la mediteraneo sendube helpas la kvietigon de la lastaj malamoj kaj malpardonemoj kaj malfermos tiam novan paĝon de paco kaj frateco inter niaj du grandaj kaj belegaj landoj: tio estus la plej granda omaĝo, kiun oni povus esprimi al ĉiuj viktimoj.

La historiistoj klarigas fore de objektiveco la eventojn, sed la rektaj atestoj certe ĉiam plenaj je emocioj helpas ankaŭ la komprenon de la menso kaj konduto de la diversaj aktoroj: du kompletigaj rigardoj por helpi pli bone juĝi. Mi legis

« Tuikero la harkio kaj la cetero » de Roger Condon. La verkisto priskribas sian travivaĵon kiel soldato dum du jaroj en Alĝerio. Li ĵetas homan rigardon kaj aparte atestas la dramon de la harkioj: indiĝenaj helpantoj aŭ anstataŭantoj en la franca armeo. Multe el ili estis forlasitaj de Francio kaj amasbuĉitaj de kelkaj frenezuloj. Mi legis ankaŭ franclingve skribitan libron « Si c'était à refaire.....une fraternité plus forte que la guerre d'Algérie» kiu indus esti esperantigita.

La verkisto Roger Winterhalter, nuntempe prezidanto de la D.M.C. (domo de la mondaj civitanoj) atestas ankaŭ sian soldat-restadon en Alĝerio, sed tie temas pri militanto, kiu ne sen kuraĝo pliigis sian batalon ene de la armeo ĝis partianiĝi kaŝite la N.F.L : nacia fronto de liberigado (en la franca F.L.N )

Tiuj ambaŭ libroj legiĝas tre facile kaj se ties legado eventuale iun interesas, jen mia retadreso por pruntodono

ginettepineda@numericable.fr

Jacques



Sinjoro KERDILES, la dekanato de la Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Homaj Sciencoj informis pri la apero de informo pri la KER-ekzamenoj en la priprofesiaj servoj de la Universitato de Alta Alzaco (Mulhouse).

<http://www.directemploi.com/magazine/>

[formation\\_initiale/1155/une-session-extraordinaire-d-](http://www.directemploi.com/magazine/formation_initiale/1155/une-session-extraordinaire-d-examens-simultanes-d-esperanto-dans-17-pays)

[examens-simultanes-d-esperanto-dans-17-pays](http://www.directemploi.com/magazine/formation_initiale/1155/une-session-extraordinaire-d-examens-simultanes-d-esperanto-dans-17-pays)

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.

## Last-minute:

## Programo 2012 de ESB :

**Dimanĉe 26.8.2012**

**Ekskurso al Inzlingen**

**Rendevuo je la 11a en Tramhaltejo Riehen Dorf Buso al Rotengraben  
Migrado al Maienbühl, Eiserne Hand, Waidhof, Inzlingen**

**Tagmanĝo en la restoracio Akropolis**

**Bonvolu diri al ni ĉu vi partoprenos :**

**hanspeter.senn@bluewin.ch**

**Focke-Inzlingen@t-online.de**

**27.9.2012**

**ekde 20a15 Monata kunveno : Ni ludas**

**Lunde**

**22.aŭ 29.10.2012 ekde 19a Saint-Louis Babilado „La Faden“  
en la restoracio „La Poste“**

**23.11.12**

**ekde 20a 15 Monata kunveno : Nova programo**

**Zamenhofa festo en Germanio**

**Nicole Bérout**

### Printempo kaj somero

